# *Malmierca renkonti?as en Washington kun estraranoj de la komerca ?ambro de Usono.*



La kuba ministro pri ekstera komerco kaj fremdaj investoj, Rodrigo Malmierca, vizitis la komercan ?ambron de Usono, kie li dialogis kun estraranoj kaj entreprenistoj de diversaj sektoroj.

En la sidejo de tiu institucio, kiu reprezentas la interesojn de pli ol tri milionoj da negocoj en tiu lando, la kuba ministro estis akceptita de la prezidanto de la komerca ?ambroj, Thomas Donahue kaj la ekzekutiva vicprezidanto kaj estro pri internaciaj aferoj, Myron Brilliant.

Same, li dialogis kun la eksa sekretario pri komerco, Carlos Gutiérrez, kiu gvidas la entreprenistan konsilantaron Usono-Kubo (USCBC), institucio kreita en septembro de la komerca ?ambro, por impulsi la eblecojn negocadi kaj faligi obstaklojn en la proksimi?o al la kariba insulo.

La kuba ministro estas akompanata de la prezidanto de la komerca ?ambro de Kubo, Orlando Hernández Guillén kaj funkciuloj de la ministerio pri eksteraj rilatoj, la centra banko kaj entreprenoj de la insulo.

La? estis informite, tiu ?i vizito ebligos konstati la nunan situacion kaj decidi kie estas la ?efaj obstakloj en scenejo markita pro la da?ra altrudo de ekonomia, komerca kaj financa sie?o kontra? la kariba lando.

La prezidanto de la komerca ?ambro de Kubo agnoskis ke tiu usona institucio jam dum 15 jaroj pledas por ?esigi la sie?on kontra? la kariba insulo, kaj li elstarigis la profitojn kiuj rezultos el tiu haltigo por amba? landoj.

La ?ambro rolas grave en la procezo aktivigita la 17-an de decembro 2014 por da?re avanci al normaligo de la reciprokaj rilatoj.

La pasintan novembron sesiis en Havano la USCBC kaj tiucele vizitis la insulon pli ol 50 gravaj entreprenistoj de usonaj kompanioj kiel American Airlines, Boeing, Heinz Krfat, Home Depot, Sprint kaj Stanley Morgan.

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/84365-malmierca-renkontigas-en-washington-kun-estraranoj-de-la-komerca-cambro-de-usono

**Radio Habana Cuba**